10.09.09

FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 3 | Julio/Septembro 2009



FS Sassnitz Foto: Scandlines

100 Jahre Eisenbahnfährverkehr zwischen Sassnitz und Trelleborg
(siehe Seite 2)

100 jaroj fervoja trafiko perpramŝipa inter Sassnitz kaj Trelleborg
(vidu paĝo 2)

100 jaroj fervoja trafiko perpramŝipa inter *Sassnitz* kaj *Trelleborg*

En 1861 la sveda urbo *Trelleborg* rericevis sian urban privilegion post pli ol centjaraj kvereloj kun *Malmö*. Nun *Trelleborg* povis memresponde agi. En 1875 ricevis la urbo konekson kun la fervojreto. En 1889 la urbo komencis konstrui fiŝkaptadan kaj protektigan havenon antaŭ la urbo. Du jarojn pli poste ankaŭ la haveno ricevis fervojkonekson.

Per tio estis farita antaŭkondiĉo por trafikkonekso sur la plej mallonga vojo inter Svedio kaj Germanio trans la Baltan Maron. Je la 6-a de julio 1909 estis malfermata la fervojtrafiko perpramŝipa inter ambaŭ ŝtatoj. En 1936 zorgis la malfermo de taluso-ponto-kombinaĵo inter la kontinento kaj insulo *Rügen* (*Rügendamm*) por plia pliboniĝo de trafiko inter Germanio kaj Svedio. En 1958 komencis funkcii la sveda pramŝipo „*Trelleborg*". Per tiu ŝipo estiĝis la erao de grandpramoj sur la Balta Maro. Unu jaron pli poste komencis la fervoja grandpramŝipo „*Sassnitz*" de la Germana Regnofervojo (*Deutsche Reichsbahn*) sian funkcion.

Ĝis 1989 la pasaĝertrafiko moviĝis en malvastaj limoj pro la vojaĝlimigo de civitanoj el la tiama Germana Demokratia Respubliko, kaj pro kontroloj de eksterlandanoj. Post 1989 la vartrafiko atingis, malgraŭ kreskanta konkurenco, baldaŭ la antaŭmilitan nivelon. Por kontentigi la pramŝipan trafikon, akiris la svedaj kaj germanaj fervojoj ĉiam pli grandajn kaj pli laborpovajn pramŝipojn.

Ekde 1998 la pramŝipoj al *Trelleborg* kaj insulo *Bornholm* frekventas la novan pramŝipan havenon en *Sassnitz-Mukran.* Per tio komenciĝis nova ĉapitro de la tradicia skandinavia trafiko.



Foto aus Wikipedia



Foto aus Wikipedia

Hoffmann / Terjung



Novaj vaporlokomotivoj

En la vaporlokomotivfabriko *Meiningen* (Turingio) estis kopikonstruataj du vaporlokomotivoj el diversaj kaŭzoj, el unu ekonomia kaj unu muzea:

Unue pro kreskanta turismo sur la etŝpura (900 mm) Meklenburgia Banloka Fervojo „*Molli*" inter *Bad Doberan* kaj *Ostseebad Kühlungsborn* ĉe Balta Maro oni bezonis aldonan lokomotivon. Ĉar turistoj pretas krompagi por vaportrakcio, oni decidis kopii tipon de sesaksa (1D1) vaporlokomotivo el la jaro 1932, de kiu tri ekzempleroj ĝis hodiaŭ regule trafikas. La nun kvara lokomotivo ricevis la numeron 99 2324-4.

Due pluraj firmaoj kaj unuopaj riĉuloj donace financis kopion de la unua tipo de saksia etŝpura (750 mm) lokomotivo. De tiu malgranda triaksa (C) tipo I K estis konstruataj de 1881 ĝis 1892 44 ekzempleroj. En trajntrafiko ili funkciis nur ĝis 1920-aj jaroj, sed unu ekzemplero servis eĉ ĝis 1964 en gisfera uzino. Bedaŭrinde tiam ankoraŭ ne regis sufiĉa konscio por konservi teknikajn memoraĵojn. Oni malmuntis la lokomotivon al metalrubo. La kopio ricevis la numeron I K 54 (99 7528-5)

Ambaŭ vaporlokomotivoj estis inaŭguritaj en julio 2009 per grandaj festoj – ĉe „*Molli*"-linio kaj en la saksa urbo *Radebeul*. Tie la saksian lokomotivon kondukis iama lokomotivestro el la gisfera uzino.



Lokomotivo 1D1 (99 2324-4)
Foto aus Wikipedia



Lokomotivo C, numero I K 54 (99 7528-5)
Foto: Daniel Theumer

Das Alter der andern...

Mir scheint, die Treppen werden heute unpraktischer gebaut als früher. Sie haben mehr Stufen, und diese werden immer höher. Früher konnte man mühelos zwei Stufen auf einmal nehmen, heute nur noch eine.

Heute braucht man viel kleinere Druckbuchstaben als früher. Ich muss die Zeitung immer weit weg halten, und die Ziffern auf den Münzautomaten werden immer schwerer lesbar. Es gibt Leute, die behaupten, in meinem Alter brauche man eine Brille, doch das ist barer Unsinn. Ich könnte mir die Nachrichten natürlich vorlesen lassen, aber auch das geht nicht; heute sprechen die Leute ja so leise und undeutlich, dass man sie kaum hören kann.

Alles ist weiter weg. Die Entfernung zwischen meinem Haus und dem Bahnhof ist doppelt so groß geworden, und dazwischen hat man einen Hügel hingebaut, den ich früher nie gesehen habe. Dazu kommt, dass die Züge früher fahren. Ich versuche gar nicht mehr, sie im Laufschritt noch zu erreichen, da sie ohnehin abfahren, bevor ich ankomme.

Man braucht auch nicht mehr die gleichen Kleiderstoffe. Die heutigen Kleider neigen dazu einzugehen, namentlich an der Taille. Und die Schuhnestel sind heute nur noch schwer erreichbar.

Auch das Klima hat sich geändert. Die Winter sind kälter, die Sommer heißer geworden. Wenn man versucht, den Schnee vor der Türe wegzuschaufeln, stellt man fest, dass er viel schwerer geworden ist, als er früher war. Die Zugluft ist viel unangenehmer geworden. Das kommt gewiss von der Art, wie man heute die Fenster herstellt. Man könnte natürlich auch jeweils in ein Land mit angenehmeren Klima fahren, wenn die Reise nur nicht so weit und beschwerlich wäre.

Die Leute sind heut jünger als sie zu meiner Zeit waren. Kürzlich habe ich an meiner alten Universität an einer Zusammenkunft ehemaliger Studenten teilgenommen und war entsetzt zu sehen, was für Kinder jetzt dort zugelassen werden. Ich muss allerdings gestehen, dass sie höflicher sind, als wir es seinerzeit waren. Sie haben mich respektvoll mit "Herr Doktor" angesprochen, und einer hat sich sogar angeboten, mir über die Straße zu helfen.

Umgekehrt sind die Leute meiner Generation viel älter als ich. Offenbar nähert sich meine Generation dem, was man ein "gewisses Alter" zu nennen pflegt. Ist das aber Grund genug, dass meine früheren Studienkameraden in einem Zustand fortgeschrittener Senilität daher torkeln? Einer von ihnen hatte sich sogar so verändert, dass er mich nicht wiedererkannte.

Heute früh habe ich mich im Badezimmer im Spiegel betrachtet. Und ich muss sagen: die heutigen Spiegel sind auch nicht mehr das, was die früheren waren.

Dieter Hartig

Evidente mi maljuniĝis

Ŝajnas al mi, ke hodiaŭ la stuparoj estas pli nepraktike konstruitaj ol estinte. La ŝtupoj estas pli altaj.Iam mi prenis du ŝtupojn senprobleme, hodiaŭ pene nur unu.
Ankaŭ la periodaĵoj havas pli malgrandajn literjn ol tiam. Miaj brakoj ne estas sufiĉe longaj por teni ilin en taŭga distanco. Okulvitron mi ne ŝatas, ĉar mi nemiam povas retrovi ĝin.
Peti familianon voĉlegi, ne taŭgas. Hodiaŭ la homoj parolas tiel mallaŭte kaj malklare, ke mi apenaŭ povas kompreni ilin.
Ĉio estas pli malproksima! La distanco de mia loĝejo al la poŝtoficejo duobliĝis kaj la vojo tien nun havas altaĵojn, kiujn mi tiam ne konstatis. Aldone la tramo ne plu veturas laŭ sia horaro. Mi intertempe rezignas, galopante atingi la tramon, ĉar ĝi ja ne atendas.
Hodiaŭ oni ne plu produktas tiel taŭgajn vestoŝtofojn kiel tiam. La hodiaŭaj konstante emas kuntiriĝi. Precipe en la talio. Por laĉi ŝuojn la ŝulaĉoj estas apenaŭ atingeblaj.
Ankaŭ la klimato ne plu kontentas. La vintroj estas pli malvarmaj kaj la someroj tro varmaj. Mi konstatis, ke neĝŝovelado estas pena afero, ĉar la neĝo nuntempe estas ege peza. La trablova aero estas ege malagrabla.
La kaŭzo estas la maniero, per kiu oni hodiaŭ produktas la fenestrojn. Mi ja volonte veturus en pli agrablajn landojn, sed la vojaĝo tien estas tro peniga.
Hodiaŭ mi rigardis min en la spegulo. Mi devas diri: la hodiaŭaj speguloj ne estas tiel bonaj kiel la iamaj.

Sed mia nomo ne ŝanĝiĝis, ĝi restis

Dieter Hartig

Ein Nachfolger für Petrus gesucht

In der Arche Noah am Europaplatz in-Nürnberg (meine Wohnanlage) herrscht große Aufregung. Tische, Bänke, Stühle und Sonnenschirme werden in den Garten geschleppt. Speisen und Getränke sind vorbereitet, Musik bestellt. Das Sommerfest soll am nächsten Tag stattfinden. Ein Problem ist Petrus! Er hat uns zwar Hilfe zugesagt, aber welcher Mann hält schon, was er verspricht?
Petrus ist alt! Er weiß: Schon seit langem sucht er einen Nachfolger. Das ist nicht so einfach!
Gewisse Bedingungen sind erforderlich:
1. Der liebe Gott muss ihn gern haben.
2. Er muss mit Engeln umgehen können.
3. Er muss alten Damen zuhören können.
   Wo ist der Mann der das kann?
4. Er muss einen Vollbart haben.

Also, meine Herren, nur Mut! Wer sich geeignet fühlt, möge sich schriftlich an Frau Freger wenden. Sie wird den Antrag wohlwollend unterstützen.
Was eine Frau verspricht, das hält sie auch!

Elfriede Kruse

Von unserer 95-jährigen Seniorin Elfriede Kruse erhielten wir folgenden Beitrag:

Ist die „SB" schon da?

Es war im zweiten Kriegsjahr. Ich war Beamtin bei der Bahn in Hannover. Viele junge Leute waren zu den Soldaten eingezogen. Ich wurde gefragt, ob ich bereit sei, „Soziale Betreuerin" (SB) zu werden. Ich war Witwe, man hielt mich für geeignet. Ich sagte „Ja". Eine dunkelblaue Dienstkleidung mit einem dazupassenden Hut wurde mir gegeben. Im Krankenhaus Hildesheim wurde ich auf die Aufgabe vorbereitet. Sie war nicht einfach, das war mir klar. Was wirklich auf mich zu kam, wusste ich nicht.

Im Konferenzraum der Direktion fand an einem Vormittag im Januar 1943 eine Krisensitzung statt. Alle Dezernenten nahmen teil. Das war mein erster Einsatz. Unvermutet öffnete sich die Tür, im Eingang stand der Präsident: „Großalarm in Bremen, wer von den Herren begleitet mich?". Mahnende Stimmen gaben zu be-denken. Es war noch keine Entwarnung gegeben. Bomben fielen, nichts als Bombern. Der Himmel war blutrot. „SB fahren sie mit?". Ich sagte „Ja". Ein Lkw mit Marketenderwaren und ein Fahrer standen mir zur Verfügung. Zwei Kollegen waren zu meiner Unterstützung. In der Heide erwartete uns eine junge Frau mit zwei kleinen Kindern, ihr Haus war ein Raub der Flammen geworden. Sie hatten nur das nackte Leben gerettet. Ich brachte sie in einer Jugendherberge unter. Zwei weitere Frauen mit größeren Kindern wurden in einer Schule aufgenommen, die auch Verpflegung übernahm. Die Frauen nahmen wir mit nach Bremen. Sie konnten uns in der Küche helfen. Meine Kollegen fanden Unterkunft in einer Gaststätte. Hinter dem Bahnhof Bremen in einem kleinen Dienstgebäude im Keller mit ausrangierten Möbeln wurden wir fündig. Ein Ledersessel war mir zugedacht. Für unsere Beine stapelten wir Backsteine auf.

De nia 95-jaraĝa veteranino Elfriede Kruse ni ricevis jenan kontribuon:

Kie estas la „SB"?

Okazis en la dua militjaro 1943. Mi estis fervojistino en Hannover. Multaj junuloj estis en la militservo. Ĉie mankis laborfortoj. Oni demandis min, ĉu mi estas preta fariĝi "Sociala Servistino" (SB). Mi estis vidvino. Oni trovis min taŭga por tiu tasko. Mi diris „jes". Bluan uniformon kaj konvenan ĉapelon mi ricevis. En malsanulejo en Hildesheim oni antaŭpreparis min por tiu ĉi tasko. Kio vere min atendis, tion mi eĉ ne antaŭvidis.

En konferencejo de la direkcio okazis dum januara antaŭtagmezo en 1943 kriza kunveno. Ĉiuj decernentoj ĉeestis. Estis mia unua tasko. Neatendite malfermiĝis pordo, en ĝi staris la prezidanto. "Granda alarmo en Bremen. Kiu de la sinjoroj akompanos min al Bremen? Sed oni avertis: "Ankoraŭ ne estis senalarme. SB ĉu vi akompanas min?" Mi diris "jes".

Kamiono kun ŝoforo kaj necesaj varoj por la viktimoj estis je mia dispono. Du kolegoj disponiĝis je mia helpo. Ni tuj ekveturis. En la Erikejo atendis nin juna virino kun du malgrandaj infanoj. Ŝia domo fariĝis viktimo de flamoj. Ili savis nur la nudan vivon. Mi petis restadon por ili en junulara gastejo. Du aliajn virinojn kun pli grandaj infanoj oni akceptis en lernejo. Ili ankaŭ garantiis la nutradon. La patrinojn ni kunigis al Bremen. Ili povus helpi nin en la kuirejo. Miaj kolegoj trovis restadon en gastejo,. mi malantaŭ la stacidomo de Bremen en malgranda oficdomo en kelo kun malnovaj mebloj. Ni trovis taŭgan seĝon por mi, por miaj gamboj ni serĉis stonojn.

Der Kantinenwirt, Herr Bode, wartete schon auf uns. Ist die SB da? Er hatte bereits einen Kessel heißes Wasser. Ich konnte Kaffee und Tee zubereiten. Eine Kanne Milch hatte mir ein Heidebauer geschenkt. Zucker hatten wir. Da die Männer noch nichts Warmes bekommen hatten, musste ich 18 Kochgeschirre füllen, für die anderen fand ich Becher. Auch der Präsident war dankbar für einen Becher – „aber ohne Milch mit viel Zucker" war sein Kommentar.

Inzwischen gab es Entwarnung. Gottlob hatte man die Männer mit warmer Kleidung versorgt. Nun galt es, sich um die Opfer zu kümmern. Die Frauen hatten Kartoffeln geschält. Ich gab Trockengemüse. Der Bauer hatte ein Lamm geschlachtet und uns die Hälfte mitgegeben. So waren wir für mehrere Tage versorgt.

Der Präsident fuhr am Abend nach Hannover zurück, nicht ohne mir zu versichern, dass ich alles Nötige bekommen würde. Ich bat um Rotwein und Rum, damit konnte ich zusätzlich etwas Warmes bieten. Schneidende Kälte herrschte in dieser Januarnacht. Um 23 Uhr brach das Inferno von Neuem los. Uns blieb nichts erspart. Polizei und BRK waren ununterbrochen im Einsatz. Man wusste der Opfer nicht Herr zu werden. Wie sollten wir das schaffen?

Am nächsten Morgen hieß der Einsatz Magdeburg. Wir fuhren nach Hannover, um die Vorräte aufzufüllen. Dann besuchten wir meine Mutter, die mir noch eine Wolldecke und Handtücher mitgab. Im großen Bogen fuhren wir um Braunschweig, um auf die Autobahn zu kommen, aber so einfach war das nicht! Wir gerieten unter Tieffliegerbeschuss und mussten im Straßengraben Zuflucht suchen. In Madgeburg war die Hölle los. Brennende und um Hilfe schreiende Menschen strömten uns entgegen. Herr Sievers, der Kantinenwirt, wartete mit eine Kanne heißem Wasser auf uns. Ich konnte sofort Kaffee und Tee bereiten. Der Kantinenwirt hatte frische Brötchen aufgetrie-ben, irgendjemand Margarine spendiert. Auch für das Mittagessen fand ich Mittel und Hilfe.

La kantinestro, S-ro Bode, jam atendis nin kun granda ujo kun variega akvo. Li demandis: "Ĉu la SB ĉeestas?". Mi tuj preparis kafon kaj teon. Sitelon da lakto donacis al mi kamparano. Sukero ni havis. Ĉar la viroj ricevis ja nun nenian varmon, mi plenumis 18 da potoj. Por la aliaj mi trovis ujoj. Ankaŭ la Prezidanto estis dankema por ujo da kafo. "Sen lakto, kun multe da sukero" estis lia komentario."

Intertempe estis senalarmigo. Dank al Dio la viroj ricevis varmajn vestaĵojn. Nun mi devis zorgi por la viktimoj. La virinoj intertempe senŝeligis terpomojn. Mi donis sekajn legomojn. La kamparanoj buĉis ŝafon kaj donis al mi la duonon. Tiel mi havis provizon por kelkaj tagoj.

La Prezidanto reveturis dum la vespero al Hannover. Li promesis al mi ĉiun necesan. Mi petis ruĝan vinon kaj rumon por ke mi povus liveri ankoraŭ varman trinkaĵon. Terra malvarmeco regis dum tiu ĉi januara nokto. Je la 23-a horo rekomencis la inferno. Nenio restis al ni ŝparita. Ni ne sciis solvi la problemojn. Kiamaniere reagu?

Alian tagon oni vokis min al Magdeburg. Ni veturis al Hannover por havi novajn varojn. Poste ni veturis al mia patrino, kiu donis al mi lanan kovrilon kaj mantukojn. Ni veturis grandan cirklon por veni sur la aŭtoŝoseon. Sed tiu ne estis simpla afero. Aviadiloj malaltflugaj pafis nin kaj ni devis refuĝi en la stratfoson. En Magdeburg atendis nin la inferno. Brulantaj, kriantaj homoj atendis nin. La kantinestro, s-ro Sievers, jam atendis nin kun sitelo da bolanta akvo. Tuj mi preparis kafon kaj teon. Iu liveris freŝajn bulkojn kaj margarinon. Ankaŭ por tagmanĝo mi trovis necesaĵojn kaj helpon.

Dann gab es Fliegeralarm. Der Bunker konnte nicht alle aufnehmen. Zum Überfluss hatten wir noch einen Wasserrohrbruch. Bis zu den Hüften im eiskalten Wasser mussten wir ein und eine halbe Stunde aushalten. Die kleinen Kinder wurden auf den Arm genommen, die großen mussten sich selber helfen. Als es endlich Entwarnung gab, entstand das größte Chaos. Wohin mit der nassen Kleidung? Kollegen hatten einen Kanonenofen entdeckt und angeschlossen. Alles was nicht niet- und nagelfest war, wurde verheizt. Mehrere Hotels erbarmten sich der Opfer, besonders der Kinder. Wir waren sehr dankbar dafür.

(wird fortgesetzt)

Tiam venis alarmo! La bunkro ne kapablis akcepti ĉiujn homojn. Aldone ni ankoraŭ ricevis akvodomaĝon. Ĝis la koksoj ni devis stari unu kaj duonan horon en malvarmega akvo. La malgrandajn infanojn ni prenis sur la brakoj, la plej maljunaj devis helpi sin mem. Ĝis finfine venis senalarmo okazis kaoso. Kien kun la nesekaj vestaĵoj? La kolegoj trovis simplan kaj muntis ĝin sur iu ajn objektojn, ni bruligis por sekigi niajn vestaĵojn. Feliĉe kalkaj hoteloj alprenis viktimojn, speziale malgrandajn infanojn. Ni estis tre dankaj por tio.

(daŭrigota)



Kalendaro

18. –20.09.2009
Esperanto-Wochenende in München

25.-27.09.2009
5a Mozellanda Esperanto-Semajnfino
Marienburg apud Zell/Mosel
Wolfgang Bohr, (02641) 4885
Wolfgang.bohr@esperanto.de

05.-09.10.2009
Esperanto-Semajno kun migrado kaj kursoj
Interkultura Centro Herzberg
(05521) 5983
www.ic-herzberg.de

23.-25.10.2009
GEFA-Jahresversammlung in Bad Ems
Achim Meinel, (03322) 425888
achimeinel@gmx.net

Schon angemeldet zur Jahresversammlung vom 23. bis 25.10. in Bad Ems?

Redaktfino por FE 4/2009 estos la 15.11.2009
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel. (06 61) 7 76 27, Fax (06 61) 3 02 96 92, E-Mail: fritzlautenbach@gmx.de
und Horst Jasmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361